

LA
PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIÓ KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII, SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kč 20.--; fremdlando Kč 25.-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Pošta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

LA PREZIDENTO DE LA ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO

T. G. MASARYK



H. B. KVĚTOŇ:

REPREZENTANTO DE LA ĈEĤOSLOVAKA DEMOKRATIO — VENKINTO SUPER HABSBRUĜOJ.


Pri la batalo de **T. G. Masaryk** kontraŭ Habsburga monarkio.

Atentigo: Legu ankaŭ la artikolon: „La fondintoj de ĉeĥoslovaka respubliko: Masaryk kaj Beneš“ en „La Progreso“ 1925 (pĝ 34-36).

Granda itala revoluciulo kaj granda malamiko de Habsburgoj Giuseppe Mazzini (1805—1872), fondinto kaj ĉefo de respublikana „Juna Italujo“ (Giovine Italia), esprimis — jam antaŭ cent jaroj — profetan opinion, ke la fino de Habsburga imperio venos kun la malapero de eŭropa Turkujo; li ankaŭ kredis, ke la decida bato kontraŭ Aŭstrio venos de Ĉeĥoj. Mazzini ne eraris. Jam en la fino de la deknaŭa jarcento la tuta politika mondo rigardis Turkujon kaj Aŭstrion kiel malsanulojn, kies mortojn oni povas atendi ĉe la plej proksima granda kunpuŝo. Efektive post la katastrofo de Turkujo en la balkanaj militoj (1912—13) sekvis la katastrofo de Aŭstrio-Hungario en la granda mondmilito (1914—18) kaj tiuj, kiuj iniciatis kaj plej konscie entreprenis kaj finis la batalon kontraŭ Habsburga monarkio, estis Ĉeĥoslovakoj lerte kaj prudente gvidataj de Tomáš Garrigue Masaryk (nun okdekjara). La cirkonstanco, ke la kondiĉo de la detruo de Aŭstrio-Hungario estis la venko de Entento super Centraj potencoj, neniom ŝanĝas la historian fakton, ke la malapero de la malnova, potenca kaj fiera monarkio estas antaŭ ĉio sukceso de la laŭplana kaj energia laboro de malgranda demokratia nacio sopiranta la reakiron de siaj antaŭaj libereco kaj ŝtata sendependeco. Kaj restos ankaŭ historia fakto, ke la plena efektivigo de la kuraĝa plano pri la detruo de Aŭstrio-Hungario estas antaŭ ĉio feliĉa rezulto de konscia, celhava kaj persista agito kaj propagando de ĉeĥoslovaka profesoro, filo de servisto (veturigisto) en la bienoj de la aŭstria imperiestro, de la nuna ĉeĥoslovakia prezidanto T. G. Masaryk.

Kvankam la malapero de Habsburga monarkio estis ĝenerale atendata kiel historia necesajo, — ĉar ĉesis ĝia historia rolo esti barilo kontraŭ turkaj enfaloj kaj ekspansio, — tamen oni devis multe kaj forte batali por konvinki la mondon pri la neceso detruai Habsburgan monarkion kaj liberigi ĝiajn naciojn. Aŭstrio-Hungario estis profektata de la internaciaj financaj rondoj, de la katolika eklezio kaj de la okcident-eŭropaj ŝtatuloj, kiuj erare kredis — kaj multaj ankoraŭ nun kredas — ke Aŭstrio-Hungario estis bazo por politika ekvilibro en Eŭropo kaj kontraŭpezo al Germanujo, kiuj timis „balcanigon“ de centra Eŭropo kaj danĝeron de panslavismo. Oni devis konvinki decidantajn ŝtatulojn kaj publikon, ke Aŭstrio-Hungario estas subpremanto de negermanaj kaj nemadjaraj nacioj, de la plejmulto da loĝantaro, ke ĝi estas vasalo de Hohencoleroj kaj peranto de germana „Premo al Oriento“ (Drang nach Osten) sur la vojo Berlin-Bagdad, ke la reganta dinastio estas degenerinta, senmorala kaj nerajtigita por malebligadi liberan evoluon al la nacioj, kiuj mem volas decidi pri si. Oni devis konvinki la mondon, ke la rezulto de la terura kaj kruela milito devas esti nepra reorganizo de Eŭropo, kaj ke la ĉefa kaj unua kondiĉo de tiu Nova Eŭropo devas esti liberigo de subpremataj nacioj per detruo de Habsburga monarkio. Por tiu laboro Masaryk faris detalan programon kaj planon kaj havigis diversnaciajn kunlaborantojn (Steed, Seton-Watson, Denis, Beneš, Štefánik k. a.), kun kies helpo li atingis sian celon.

La batalo de la ĉeĥoslovaka nacio kaj de Masaryk kontraŭ Habsburgoj ne es-



tis komencita nur en la mondmilito. Preskaŭ tri cent jarojn daŭris la lukto inter Ĉeĥoslovakoj kaj Habsburgoj kaj Masaryk estis ĝia eminenta partoprenanto jam kiel deputito en la aŭstria regna parlamento en Wien (1891, 1907, 1911), kiel deputito en la bohema (ĉeĥa) landa parlamento en Praha kaj kiel membro en la delegitaroj („delegacioj“) de aŭstria kaj hungaria parlamentoj (alterne en Wien kaj Budapeŝto) por la komunaj aferoj de la monarkio (eksterlandaj aferoj, armeo, imperiestra domo, kontrolo de la administracio en Bosnio kaj Hercegovino). Jam tie, sur la parlamenta tribuno, li montriĝis granda kontraŭulo de la habsburga dinastio forte kritikante la regantan reĝimon kaj atakante ĝiajn metodojn.

Kiam li fariĝis la unuan fojon (oktobron 1892) membro de la aŭstri-hungariaj delegitaroj, li laŭ siaj detalaj studoj pri la situacio sur la loko mem akre atakis la kruelaĵojn de la registaro en Bosnio kaj Hercegovino, analizis kaŭzojn de la grandega malkonsento de tiea loĝantaro kaj kondamnis la aŭstri-hungarian administracion antaŭ la tuta mondo. Jam tiam (en 1892) li profete proklamis, ke la okupon de tiuj landoj (1878) kaj ĝiajn sekvojn li rigardas kiel la plej grandan problemon de la aŭstria politiko, eĉ de la aŭstria monarkio, kaj la sekvojn de la teruraj germanigo kaj madjarigo nomis „komencoj de disfala procedo“. Tuj poste (novembron 1892) en la aŭstria regna parlamento li preparolis la rilaton de la ĉeĥa nacio al Aŭstrio, riproĉis, ke Aŭstrio fariĝas provinco de Germanujo, kaj proklamis: „Ni volas sendependon kaj sindestinon de la ĉeĥa nacio, ni volas tutan kaj plenan nacian vivon.“ En alia parolo (marton 1893) li minace proklamis: „Aŭstrio ne malhelpos la liberigon de nia nacio“; tiam ŝovinistaj germanaj deputitoj (Menger k. a.) vokis: „Vi estas perfidulego!“ En kunsidoj de aliaj aŭstri-hungariaj delegitaroj (junion 1893) li parolante pri bosniaj aferoj eĉ devigis la prezidanton (princon Windischgrätz) rezigni.

Fariĝinte post dekkvin jaroj denove membro de la aŭstria parlamento kaj aŭstri-hungariaj delegitaroj, li ankoraŭ pli radikale kaj danĝere montriĝis mal-

amiko de Habsburga monarkio, ĉar tiam li jam perdis (kie! antaŭ li ĉeĥa politikisto Palacký dirinta: Ni ekzistis antaŭ Aŭstrio, ni ekzistos post ĝi) sian antaŭan kredon, ke oni povus transformi Aŭstri-Hungarion en justan federacion de liberaj nacioj. Tiam li altiris la atenton de la tuta mondo al la senmorala eksterlanda politiko de Habsburgoj. Tiama aŭstri-hungaria ministro de eksterlandaj aferoj (barono Aehrenthal) volis pravigi la anekson de Bosnio kaj Hercegovino (1908) kaj la preparojn por la milito kontraŭ Serbujo per tio, ke oni akuzis grandan nombron (53) de Serboj kaj Kroatoj pro regno-perfido, ke ili por mono de Serbujo preparis konspiron kontraŭ la monarkio. Masaryk kun grandaj zorgoj kaj klopodo savis akuzitojn antaŭ la pendigilo pruvinte, ke la dokumentoj kontraŭ ili estas falsaj faritaj kun direkta kunlaboro de la aŭstri-hungaria ministerio por eksterlandaj aferoj. La malkaŝo pri malhonestaj kaj senhontaj metodoj de la habsburga eksterlanda politiko montris tiam al la tuta Eŭropo la malforton de la habsburga dinastio kaj monarkio. Ne estas sen intereso, ke en unu opozicia parolo en la delegitaro (oktobron 1910) Masaryk proponis internacian interkonsenton pri senarmigo kaj arbitraco.

En novaj parlamento kaj delegitaroj (1911) — kiam venkita Aehrenthal jam cedis al Berchtold — Masaryk atakis diplomaciajn intrigojn de Aŭstri-Hungario kontraŭ balkanaj ŝtatoj militantaj kontraŭ Turkujo (1912—13) kaj poste inter si. Tiam li avertis (novembron 1912): „Mi simpatias kun la kristanaj nacioj de Balkano, sed mi decide estas por la politiko de paco. Mi ne povas imagi, ke Aŭstrio per sia interveno volus kaŭzi mondan militon. Mi malamas militon kaj por bono de la homaro mi deziras eternan pacon...“ Kun ĉiu energio li faris provon (decembron 1912) interpaciĝi Aŭstri-Hungarion kaj Serbujon, sed li estis kun moko rifuzita de Aŭstrio (Paŝiĉ konsente akceptis, sed Berchtold malŝate rifuzis suspektante lin, ke li volas gajni monon kiel makleristo). Li ankaŭ faris preparojn por repaciĝi Bulgarujon kaj Serbujon por ke ili staru kune en eventuala kon-

flikto de Serbujo kun Aŭstrio, sed tiun provon malebligis eksplodo de la milito.

Kiam Aŭstrio sen konsento de la parlamento, do ankaŭ sen konsento de ĉefaj deputitoj, kaj kontraŭ volo de la ĉefa nacio komencis (julion 1914) longe preparatan militon kontraŭ Serbujo (oni rememoru sekretajn mobilizojn en 1908 kaj 1912), kiam ĉeĥoslovaka nacio estis devigata batali por sia subpremanto kaj kontraŭ siaj amikoj, kiam Aŭstrio postulis oferojn de sango kaj havo kaj samtempe per ekzekutoj, malliberigoj, konfiskoj kaj rekvizicioj persekutis la popolon, kiu ne volis montri simpatian kaj entuziasmon por la milito, tiam Masaryk decidis entrepreni decidan batalon kontraŭ Habsburgoj kaj ilia imperio, organizi liberigan revolucion de la ĉeĥoslovaka nacio.

Li observis situacion kaj esploris opiniojn kaj intencojn de decidantaj personoj en Aŭstrio, Germanujo kaj Italujo, li kunvenis en la neŭtrala Holando kun siaj amikoj el Anglujo kaj Francujo, de kiuj li konatiĝis kun situacioj kaj planoj de la ŝtatoj de Entento, hejme li konsiliĝis kun politikistoj de ĉiuj partioj kaj ĉefoj de tutenaciaj organizaĵoj (Sokol k. s.) kaj kun ili kaj kelkaj siaj amikoj li kaj Beneš kreis sekretan revolucion rondeton (nomitan poste „Mafio“), kies celo estis nutri revolucion animstaton de la popolo, kolekti gravajn informojn pri entreprenoj de la registaro kaj armeestaro, kolekti monon kaj esti peranto inter la laborantoj interne kaj ekstere de la monarkio. Laŭ interkonsento kun reprezentantoj de la ĉeĥoslovaka politiko li verkis memorandumon pri la ĉeĥa vidpunkto pri la reorganizo de Eŭropo kaj sendis ĝin al siaj anglaj amikoj. Ankaŭ al amerikaj Ĉeĥoj li sendis informojn.

Kiam li en la neŭtrala fremdlando (Italujo decembron 1914) ricevis sciigon, ke li ne povas plu reveni, ĉar la aŭstria registaro ordonis aresti lin, li komencis sian revolucion laboron en eksterlando: li laboris en Svislando, Francujo, Anglujo, Rusujo, Siberio, Japanujo kaj Usono, li, sesdekkvinjara maljunulo ĉirkaŭveturis la tutan terglobon senĉese laborante, preskaŭ nedormante kaj sciante, ke hejme lia fa-

milio (la edzino, du filoj, unu filino) estas viktimo de habsburga venĝo.

En ĉiuj ĉi landoj li unuigis tre disigitan laboron de ĉeĥoslovakaj kolonioj, kiuj jam de la komenco de milito proponis siajn servojn al la ŝtatoj loĝataj de ili, li organizis ĉeĥoslovakajn militkaptitojn, li informis gazetojn, influajn personojn kaj publikon pri la programo de reorganizo de Eŭropo, pri la plano detruiri Aŭstrion kaj liberigi subprematajn naciojn kaj fine kun helpo de siaj influaĵaj amikoj li trovis rilatojn kun oficialaj rondoj en Paris, London, Washington, kaj tiel senpere per siaj klarigoj, informoj, konsiloj, polemikoj k. s. efikis je decidantaj ŝtatuloj. Per sia sekreta kontakto kun la patrujo li havigis al Entento sciigojn el Aŭstrio kaj al ĉefaj politikistoj tiujn el fremdlando. Samtempe li kunlaboris kun la reprezentantoj de ĉiuj ceteraj subpremataj nacioj, de kiuj li estis elektita ĉefo. („Mezeŭropa demokratia unuiĝo“).

En la tempo, kiam la milita situacio estis neniel favora al Entento, Masaryk energie invitis (Genevo, 6. 7. 1915) eksterlandajn Ĉeĥoslovakojn aliĝi al Entento kaj servi al ĝi per ĉiuj rimedoj, kaj eĉ deklaris (14. 11. 1915, kiam Beneš alportis el Praha konsenton de ĉefaj ĉeĥaj politikistoj) la militon de Ĉeĥoslovakoj kontraŭ Habsburga imperio. Tre malfacile li sukcesis venki kontraŭstaron de decidantaj ŝtatuloj, kiuj ne volis permesi la organizon de armeo el ĉeĥoslovakaj militkaptitoj, ĝis li povis organizi negrandan (centomilan), tamen rimarkindan, vere unikan armeon, kiu fariĝis la plej efika apogo de lia penado.

Tiel malfacile, malrapide, sed certe Masaryk atingis, ke li kun Beneš kaj Štefánik povis sin proklami (14. 10. 1918.) kaj estis rekonitaj kiel provizora registaro de Ĉeĥoslovaka ŝtato, kaj ke la ĉeĥoslovaka centomila armeo („legionoj“) estis rekonita kiel militanta. Fine (18. 10. 1918 en Washington) li povis deklari ĉeĥoslovakon sendependecon kaj sentronigon de Habsburgoj. Baldaŭ poste la popolo en Ĉeĥoslovakio fakte transprenis (28. 10. 1918.) la regadon en siajn manojn kaj elektis (14. 11. 18.) sian liberiginton dumvive reelektebla prezidanto de la res-

publiko. La ceteraj nacioj de la monarkio sekvis tiun ĉi ekzemplon — la regado de Habsburgoj estis finita. La paca konferenco povis sole konstati la fakton: finis *Äustriae*. La „mal-sanulo sur Danubo“ falis kun la „mal-sanulo sur Bosporo“ — klarvida profetaĵo de Mazzini efektiviĝis. Montriĝis ĝusta ankaŭ la atendo, ke la falo de Habsburgoj estos venko de Ĉeĥoj. Historia destino plenumiĝis. Nemesis montris sin justa.

Super la fieraj dinastio kaj imperio venkis la ideo kaj laboro de simpla demokrato Masaryk, venkis Masaryk kun siaj legioj. Li per sia aŭtoritato kaj seriozeco gajnis fidon kaj respekton de fremdaj ŝtatoj kaj de propraj samnaciaj, kiujn fidon kaj respekton neniu alia povis gajni. Tiuj ĉi fido kaj respekto helpis al li, ke li povis unuigi kaj por sia granda celo uzi revolucion movadon de eksterlandaj Ĉeĥoslovakoj kaj militkaptitoj, kiu movado sen lia gvido devis malsukcesi pro malkonkordo. La venko de Masaryk estas ne sole venko de Ĉeĥoslovakoj, sed ankaŭ de ĉiuj malgrandaj subpremataj nacioj t. e. ĝi estas venko de Nova Eŭropo.

Ideo pri Nova Eŭropo t. e. ideo pri Eŭropo reorganizita sur la bazo de la sindestino de liberaj nacioj estis ĉefa ideo kaj programo de la mondmilito. Kaj tiu programo akceptita de la ĝvidantaj ŝtatoj — Wilson, Briand, Pichon, Balfour, Orlando, Sonnino — kaj paca konferenco devenis de ĉeĥoslovaka elmigrinto, kiu tuj en la komenco de la milito klare kaj detale ĝin formulis kaj dum la tuta daŭro de la milito energie kaj lerte ĝin publikigadis en sennombraj informaj, propagandaj kaj agitaj artikoloj, paroladoj, intervenoj kaj intervjuoj, en deko da memorandumoj al decidantaj ŝtatoj kaj registaroj de militantaj ŝtatoj, en diplomaciaj proklamoj kaj en la ankoraŭ antaŭ la fino de la milito eldonita libro „Nova Eŭropo“ („New Europe“, 1918). Se tiu ĉi ideo estis plifortigita kaj ĝia realigo plifaciligita de la rusa revolucio, tio neniel malgrandigas, kontraŭe pligrandigas signifon kaj valoron de la laboro, kiun Masaryk faris dum la mondmilito por Nova Eŭropo.

Sed Masaryk ne sole inspiris al la

mondo la ideon pri Nova Eŭropo kaj kreis ĝian programon, ne sole venke batalis por ĝi, sed li ankoraŭ nun plej sindone kaj efike defendas ĝin kontraŭ multaj malamikoj, kies interesojn la nova ordo ne kontentigas. Tial la respekto esprimata de la mondo al Masaryk montras la konsenton de la mondo kun la ideo de Nova Eŭropo, kiu certe ne estas absolute perfekta, sed kiu tamen estas pli justa kaj natura ol estis Eŭropo minacata de tri teokratiaj imperioj forigitaj de la mondmilito, minacata de tri degenerintaj dinastioj, de katolikaj Habsburgoj, protestantaj Hohencoleroj kaj ortodoksaj Romanovoj. Oni ne forgesu, ke la evoluo de Nova Eŭropo ne estas finiĝinta, sed ĝi nur komenciĝas: Nova Eŭropo efektiviĝis nur ekstere, ĝia interna evoluo kaj definitiva firmigo estas tasko de la nuna kaj venonta tempoj! Labori por la interna proksimiĝo de liberaj nacioj de Nova Eŭropo estas labori por la paco kaj humaneco en la spirito de Masaryk. Ĉu ĝi ne estas ankaŭ laboro en la spirito de esperantismo?

Pri la vivo kaj laboro de T. G. Masaryk legu la interesan libron

MALRIĈA KNABO, KIO GLORIĜIS

Verkis Dr. Jan Herben.

Tradukis

T. Mrázková kaj B. Pittner.

Eldonis

Moraviaj Esperanto-Pioniroj.

136 p. 15 × 20 cm.

Prezo 16 Kč aŭ 2.50 sv. fr.

Post ricevo de la mono (uzu blankopagilon de Jan Minář, knihtiskárna a litografie Nymburk. Nro 76.847 Praha aŭ Ĉasopis La Progreso Praha Nro 34.271) sendas

Esperantské knihkupectví

Jan Minář, Nymburk.

Objednejte si pro své známé v cizině další výtisky tohoto čísla Progrese.



T. G. Masaryk kun la estinta ministro-prezidanto Antonin Švehla.

PRI LA INFANAĜO KAJ EDUKO.

El interparoloj de T. G. Masaryk kun d-ro Karel Capek (K. C.: Hovory s T. G. Masarykem. I. Str. 38—47.) esperantigis H. K. Bouška.

Mi tion resumus tiel: por la infano la unua kaj ĉefa lernejo estas familio; kaj la familio, kompreneble, edukas kaj instruas la infanon malpli per tio, kion ĝi ordonas kaj malpermesas al ĝi — ĉe ni en ĉio, ankaŭ en familio, ekzistas tro multe da predikado — sed pli per tio, kion la infano hejme vidas. Sekve, kiaj estas la gepatroj, kiel la patrino tiel la patro, kia estas ilia rilato inter ili kaj al la ĉirkaŭaĵo, tio plej multe influas la infanon. Mi petas vin, se tia infano rimarkas malharmonion kaj disputojn de la gepatroj, iliajn malĝentilecon, malrespekton, malveremon, kiel ĝi povas, se ĝi tion ĉiuforte ne venkos en si, fariĝi ĝentilhomo? Oni diras: „čím hrněček navře, tím páchne“ (libere: la poto odoras laŭ tio, kio bolis en ĝi). Tio validas ankaŭ pri la familio.

Egale grava estas la rilato de la infanoj inter si mem, de la pli al la malpli aĝaj. Mi opinias, ke ne estas bone esti ununaskito. Inter gefratoj ekzistas natura leĝo de pliaĝo: la malpli juna ĝvidas, la pli junaj lin obeas aŭ almenaŭ imitas. Kaj plue venas la rilato inter fratinoj kaj fratoj: la malpli juna frato gardas siajn fratinojn, la malpli juna fratino estas preskaŭ patrieto por la malpli grandaj gefratoj. Tiel oni havas jam inter la infanoj antaŭbildon de plenkreska vivo.

Jen poste parencoj, baptogepatroj, najbaroj kaj ilia influo: ĉio ĉi en sia kompleto kaj konkreto reprezentas edukan influon de familiaro. Malnovaj ordoj — organizitaj familiaroj aŭ familia komunumo („zádruha“) — malaperis, sed iliaj regularoj daŭras en alia, pli libera formo kaj influas la formiĝon de infano. Tiu pli proksima rondo de parencoj, jen la unuaj homoj, kun kiuj la infano rilatas kaj kiujn ĝi observas — ofte eĉ tro bone observas. — — —

La influo de lernejo ne estas sole didakta, sed ankaŭ morala. La infano sukcesas trarigardi sian instruiston, se li estas maldelikata, maljusta, malzor-

ga; ĝi vidas, kiel li kondukas al siaj ĉefoj, ekzemple al inspektoro ĉe inspekto, al sinjoro vilaĝestro, al sinjoro dekano — ĉio ĉi poste efikas la karakteron kaj moralan konvinkon de la infano. Jen poste la influo de kunlernantoj kaj kunlernantinoj, kiom da familiaj kaj sociaj momentoj tie interkruciĝas! — — —

Poste la knabo trovas kamaradon; lin li senĉese kunestas, konfidas, sekvas kiel ekzemplon; siajn kamaradojn li ŝanĝas dum daŭro de tempo, kvazaŭ li kompletigis kaj korektus sian unua-tempan elekton.

Vera miregaĵo por la infano estas lernejoj kolektaĵoj kaj libroj. — — — Kian signifon havas por infano, se ĝi la propran regionon povas konatigi al si laŭ kolektoj de mineraloj, plantoj kaj remburitaj bestoj! Kompreneble tia instruado estas ankaŭ problemo de mono — havi en vilaĝo sufiĉantan lernejon, havi sufiĉe da instruistoj (en mia tempo mi eĉ ne aŭdis pri instruistinoj) kaj krom tio diversajn kolektaĵojn kaj librojn — hodiaŭ jam ĉiu lernejo povus posedi sufiĉe de tiaj helpiloj; sole havi por tio sufiĉe da mono, sole scii dediĉi ĝin por tio!

Ad vocem (koncerne) librojn por la infanoj; ni nomas ni nacio de Komenský (Comenius) kaj ni havas tiom malmultan literaturon por infanoj kaj ankoraŭ malpli de tiu bona! Multe mi estis meditanta pri tio, kial, de kie tiu manko. Kaj tio estas manko ankaŭ morala. La plejmulto de nia infana literaturo estas teda kaj enuiga moraligado — la verkistoj kaj verkistinoj trudas al si tiel nomatan popularigon kaj ian babilon, sed ili ne havas sufiĉan psikologion por kompreni infanan animon, ĝian realecon kaj raciecon ĉe ĉia naiveco, ĝiajn interesojn kaj horizonton. Estas por mi turmento, kiam mi ien venas kaj tie estas alparolata de infano ne per ĝiaj propraj vortoj, sed per grandaj, patosaj paroloj en ĝian buŝon metitaj de plenkreskuloj; neniam la infano uzus tiajn vortojn. Nia socio, tion oni ĝuste vidas laŭ ĝia porinfana literaturo, ankoraŭ nesufiĉe amas la infanojn, eĉ se ĝi dorlotas ilin.

Jen ĉiuj ĉi influoj — de la familio ĝis la lernejo kaj legaĵo — influas la

edukon de infanoj; kiom da komponentoj tie! Reformi la edukadon de infanoj, tio ne signifas sole perfektigi la didaktikon en lernejo; tio signifas reformi ankaŭ la vivon de ni plenkreskuloj; ni estas fundo, el kiu kreskas novaj generacioj — multe dependas de ni, ĉu ili estos pli bonaj aŭ feliĉaj. Estis prava tiu saksa ministro, kiu al

lejo. Bona edukado kaj instruado devas esti kiom eble plej individua; koncerne tion ĉe ni oni faras vicon da eksperimentoj, sed mi farus ankoraŭ pli multe da ili — sed ĝuste la individuigo de la lernejo postulas — tiun monon!

Prenu ankaŭ la socian problemon en la eduko — la infanoj estas la plej terura „memento“ de paŭperismo (malri-



T. G. Masaryk kun verkisto Alois Jirásek kaj lia familio.

la deputitaro veninta al li kun proponoj pri la eduko de infanoj diris, ke la eduko de infanoj kaŭzas nenian zorgojn ĉe li, sed la eduko de maturkreskuloj. Kaj denove kaj senĉese tiu problemo de mono. Prenu sole la edukon el vidpunkto de higieno, tiun de infanoj nenormaj aŭ sentalentaj, tiun de infanoj senmoralaj; oni diras, ke bona lernejo ŝparas monon bezonan por malliberejo, malsanulejo kaj malriĉu-

ĉeco). Mizero kaj malriĉo, tio ne estas sole tiuj nesufiĉantaj nutrado kaj vestado, sed tiu terura loĝado! En somero estas facile, sed en vintro! La tuta grandnombra familio kune en unu ĉambro — kiajn intimajn kaj ofte terurajn spertojn en ĝi havas la infano, kaj tiuj spertoj estas pli profundaj, pli fatalaj ol tiu abstrakta moraligo en lernejo kaj semajna prediko en preĝejo! Socia problemo estas antaŭ ĉio problemo de la

eduko.

Problemo de infana sano! Mi eĉ ne povas kompreni, ke oni ĝis nun nesufiĉe zorgas pri ludejoj, banejoj kaj parkoj por infanoj — ju pli malriĉa kvartalo, des pli multaj devas esti, ĉar en ili estas pli multe da infanoj. Vi diras ke ĝuste ŝprucigante ni povas havi egale herboriĉajn ludejojn kiel en Anglujo; denove estas demando posedi monon por tio, tio estas ŝpari monon por la infanoj — jen la plej celhava investo. Komprenoble estas diferenco inter kamparo kaj urbo; en vilaĝo la tuta komunumo kaj ĉirkaŭaĵo estas ludejo por infano.

Tio ĉi estas problemoj de edukado, krom tio estas problemoj de didaktiko, kiel ĉion instrui; bone, ke oni multe, diskutas pri tio. Tuj unualoke — la religio. Por mi jam kiel knabo estis ridinde, kiam en lerneja atesto oni metadis noton el „religio“ — kio ĝi estas? Noto pri tio, ke knabo reproduktas katekismojn — tio ne estas ja religio! Tio, kion oni nomas religia problemoj, estas ankaŭ grandparte problemoj de lernejo, sed denove ne sole de lernejo; ĝi estas problemoj de la tuta vivo. Ni vivas certe en transira tempo; ni travivas profundan religian krizon. Skeptiko kaj religia indiferentismo — propra ateismo ne estas skeptiko, sed indiferenteco! — tuŝas nature ankaŭ la infanon. La krizo estas ja ĝenerala, ĝi estas en familioj; ordinare oni vidas ke la patroj kondukas al la religio malpli varme ol la patrinoj — la infano havas impreson, ke la religio estas iel por virinoj kaj infanoj; tial ĝi forĵetas ĝin tuj, kiam ĝi komencas maturiĝi. Kaj kio rilatas influon de lernejo, eĉ se la instruisto ne laboras kontraŭeklezie, jam de la unua klaso la infano ricevas senproporcie pli da instruoj kaj impresoj sciencaj ol religiaj. Kaj tiuj impresoj, tiuj sciencaj scioj, konsekvence ĝisfine pripensitaj, kondukas la infanon kaj lernanton al religiaj duboj. En la lernejoj, en la animoj de nia junularo havas ja lokon tiu historia procedo nomata konflikto de la scienco kaj kredo, batalo de la scienco kaj religio. Ĉion ĉi mi estis travivanta intense, eĉ se senskue; sed por multegaj lernejoj estis loko de la plej grava krizo.

Laika lernejo, kie ĝi ekzistas, flanke lasas la religion; sed mi ne povas prezenti al mi nian homon, kiu kreskus sen scio pri Jesuo kaj lia instruoj; tamen eĉ la enhavo de Malnova testamento apartenas al fundamenta kultura posedaĵo de la eŭropa homo. Kiu ne konus la enhavon de kristanismo, tiu estus propre fremdulo sur nia kultura tero; kaj kiel iu povus kompreni la historion kaj ordojn de Eŭropo, se li ne estus instruita pri la esenco kaj evoluo de eklezioj? Sed jen estas malfacilaĵo, kiel tion instrui, el kiu vidpunkto taksu historiajn faktojn — malfacilegaj problemoj por lernejo. Mi mem senĉese ripetas kaj akcentas, ke la religio estas esenca elemento de la spirita vivo kaj kulturo, kaj tial ne sole la instruado al kaj pri la religio, sed ankaŭ la religia praktiko estas por mi granda kaj nesolvita demando de lerneja politiko.

Mi vidas kaj aŭdas, ke ni atingis bonan sukceson en porarta eduko en popolaj lernejoj. Jen kiajn ni havas be'ajn ilustritajn alfabetlibrojn, bonajn legolibrojn — sole posedi ankoraŭ bonan literaturon por infanoj, bildojn kaj skulptaĵojn en lernoĉambroj, por ke la infano forportu el la lernejo vivan bezonon de la arto. En mia epoko la instruisto lernigis al ni ludi violonon kaj ni ekzercis la kantadon precipe eklezian — tio estis io; hodiaŭ oni plendas pri manko de tempo, la materioj lernotaj estas pli multaj ol estis, kaj tial oni forgesas la artedukon — sekve, mi pensas, perfektigi metodojn de instruado kaj estos pli da tempo.

En kamparo, kiel mi kreskis, estas la tuta eduko pli simpla kaj pli primitiva; la infano en kamparo ne estis kaj ankoraŭ hodiaŭ ne estas tuŝata de tiom da impresoj kiel la infano en urbo. Sed nun la kamparo rapide ŝanĝiĝas kaj urbiĝas — ne ĉie egale; Slovakujo kaj Subkarpata Rusujo restas ĝis hodiaŭ multe pli kampara ol Bohemujo — tiujn ĉi diferencojn devas atenti prudenta kultura politiko. Jam en la infanaĝo mi estis aŭdanta, ke la kamparo estas pli sana ol la urbo, pli sana fizike kaj morale; en postaj jaroj mi ekkonis opiniojn de socialistoj kontraŭ la urbo. Mia sperto estas ke la urbo,

eĉ la grandurbo ne estas morale pli malbona kaj ĝi ne havas pli malbonan moralan influon al infanoj ol la kamparo. Eĉ higiene la urbo ne estas malpli bona ol vilaĝo, pli kontraŭe — atentu malgrandajn infanojn en la urbo kaj en la vilaĝo! Urba homo havas relative pli bonan kuracistan helpon kaj precipe per la sporto kaj gimnastiko („sokokolado“) pli grandan kulturon de la korpo. Ĉe la rapida urbiĝado de la kamparo estas moderna eduko, precipe moderna zorgo pri la korpo, en la kamparo egale bezona kiel en la urboj — tio estas komplikita problemo kaj la registaro kaj publikaj laborantoj devus tion bone observi. Koncerne la moralon de la vilaĝo kaj urbo mi dirus, ke la malĉasto de la vilaĝo estas alia ol en la urbo. La vilaĝo estas en ĉio pli simpla ol la urbo, sekve ankaŭ en moralo kaj nemoralo; la vilaĝo estas morale pli maldelikata, la urbo pli rafinita. Mi dubas, ke la kamparo speciale sekse estas pli ĉasta ol la urbo. Kion oni skribas pri tio en rakontoj, tio estas sole atesto pri malbona kaj maldefala observo kiel pri la kamparo tiel pri la urbo. Cetere pri tio ekzistas jam speciala literaturo, kiu konfirmas mian opinion. Sekve — denove la demando de eduko.

Kaj ankoraŭ mi dirus: ne sole la gepatroj kaj instruistoj edukas la infanojn, reciproke la gepatroj kaj instruistoj estas edukataj de la infanoj — pli ol oni juĝas. Observi la infanon kun amo kaj intereso, el tio la plenkreskulo gajnas multan instruon; kaj, se ni en lernejoj propriĝus al la infanoj pli liberajn, pli demokratiajn kutimojn — ekzemple ĉe la saluto kaj en interrilatoj — ni tion lernus de ili.

Mi diras, hodiaŭ la situacio estas alia ol ĝi estis en mia junaĝo. Nia socio pli diferenciĝis; krom terkultivistoj, inter kiuj mi estis vivanta, ekzistas industriaj laboristoj kaj industriistoj, plimultiĝas studintaj homoj, grandiĝas ankaŭ la nombro de riĉuloj, kio ne ekzistis pli frue. Krom la socialistaj teorioj aperas provoj konstrui filozofion de terlaboro, la industrio kaj tekniko alportas kune idealojn de amerikanismo — sinjoro, tio estas grandaj pro-

blemoj, kiuj ankaŭ havas rilaton al la eduko kaj lernejo.

Oni jam multe laboras en la konkreta kaj pedagogia psikologioj, en pedopsikologio; oni posedas verkojn pri kapabloj de infanoj kaj junularo, pri testoj kaj psikometrio, pri infanaj difekteco (nenormeco) kaj krimeco — ĉio ĉi vere estas sole en komencoj, sed estas progreso, ke oni pri ĉio ĉi pli multe pensas. Plejmulte oni bezonas, ke ni pli multe amu niajn infanojn, ne per paroloj, sed per faroj, ke ni pli multe zorgu pri ili kaj pli multe vivu kun ili. Tio fuŝas plej multe sinjorojn patrojn. Tiel ofte oni vidas kiel tia homo kolektas monon laŭdire por ke liaj infanoj fartu pli bone; sed en la dua, tria generacio la mono estas malaperinta kaj la familio elmortas — estas frapanta fakto, kiel malmulte da malnovaj riĉaj familioj ekzistas ĉe ni. Do prefere zorgi pri la familio tiel, ke en ĝi kresku sanaj, honestaj, memstaraj homoj...

Ofte mi meditas pri tio, kia estas diferenco inter vilaĝo, kaj kompreneble ankaŭ inter urbo, en la tempo de mia junaĝo kaj la nuna! Hodiaŭ la infano estas sub influo de radio kaj gramofono, ĵurnaloj kaj eventuale infanaj gazetoj, sub influo de la plej diversaj ilustraĵoj, hodiaŭ oni pli multe kaj pli facile vojaĝas — — pri ĉio ĉi ni neniom sciis. Mi havis nenion por legi, mi aŭdis sole malmulton, mi ne povis vojaĝi; pro tio la preĝejo estis por ni pli grava ol ĝi estas por la infanoj hodiaŭ, ĝi estis unu sola rimarkinda konstruaĵo krom la palaco, sed en la palaco ni ne povis eniri, male en la preĝejon ni estis irantaj kaj vidantaj tiel unufoje dum semajno konstruaĵon aerhavan, grandan, ornamitan, kie ni aŭskultis predikon kaj muzikon, kie kunvenis ĉiuj vilaĝanoj — kiaj aliaj devus esti hodiaŭ tia prediko kaj la tuta preĝeja atmosfero por altiri plenkreskulojn kaj infanojn tiel, kiel antaŭ la sepdek jaroj — denove ni estas ĉe la hodiaŭa religia krizo kaj ĝia influa kaŭzo!

* * *

Atentigo: Klarigantaj rimarkoj inter krampoj devenas de la tradukinto.

MISS GARRIGUE.

Fragmentoj el la verko de K. C. (dro Karel Capek) „Hovory s T. G. Masarykem“ (Interparoloj kun T. G. Masaryk. I. 108–114, 115, 118) esperantigitaj de M. B. Květoňová.

En Leipzig — okazis en somero 1877 — mi travivis sortan okazaĵon, kiu fariĝis decidanta pri mia tuta vivo, pri mia spirita evoluo; tio estis mia konatiĝo kun Charlotte Garrigue.

Pri ŝi kaj ŝia tuta familio, precipe pri la patro, mi multon aŭdis de ĝesinjoroj Goering; nome sinjorino Goering havis en Leipzig pensionon, en kiu mi tiam loĝis. Mi sciigis, ke ĝesinjoroj Garrigue devenas el malnova hugenota familio; Mr. Garrigue, naskita en Kopenhaven konatiĝis kun la familio Goering, kiam li estis en Leipzig en librovendejo. Li elmigris Amerikon; lia edzino, patrino de Charlotte — naskita Whiting — devenis el amerika Okcidento kaj ankaŭ el malnova familio. Do, la patro posteulo de Hugenotoj, la patrino de la familio de tiuj pioniroj en Okcidento de Ameriko — kia estas en tio tradicio de viva kaj morala energio!

En la jaro sepdeka Mr. Garrigue kun parto de sia familio estis en Germanujo; Charlotte jam tiam dediĉis sin al la studo de muziko, pianludo. Ŝi havis okazon viziti Liszt kaj multon aŭdi pri lia muzikista rondo. Ŝi estis vizitanta koncertojn en Gewandhaus kaj motetojn en la preĝejo de Sta Tomaso, kie oni daŭrigis tradicion de ĝlora Bach, iam tiea „regens chori“ (ĥorestro). Ŝia plej bona kamaradino el tiu tempo estis Malgrandrusino Kirpotina. En la jaro sepdeksepa sinjoro Garrigue denove venigis ŝin al Goering, por ke ŝi finu studojn en konservatorio; sed parta rigidiĝo de mano rompis ŝian muzikistan vojon.

Nature mi estis scivola je ŝi jam antaŭe; kiam ŝi estis venonta, mi atendis apud la fenestro por vidi ŝin elirantan el droŝko. Unufoje ni faris ekskurson, sciuj, tien, kie estas tiuj iam slavaj vilaĝoj apud Leipzig, kiuj efikis ankaŭ je Kollár; tie ni surboate transveturis la riveron, la boato puŝbatis bordon kaj sinjorino Goering falis akvon. Ŝi bedaŭrindulino estis neordinare dika kaj ŝi estus droninta; do mi saltis por ŝi

kaj eltiris ŝin. Ĉe tio mi iel malvarmumis aŭ kio, mallonge kuracisto ordonis resti kelkajn tagojn hejme. Mi ne povis viziti prelegojn kaj tial mi proponis al Miss Garrigue kaj fraŭlino Goering ian kunan legon. Ni legis anglajn librojn, iujn poemojn, kaj precipe Historion de la civilizo de Buckle. Tiam ni proksimiĝis.

Charlotte forveturis al Düringen, Elgersburg'on, al sia amikino. Kiam ŝi forveturis, mi ekkonsciis mian rilaton al ŝi kaj mi skribis al ŝi leteron, en kiu mi proponis al ŝi kuniĝon por la vivo.

Ŝia respondo estis sendecida; do mi prenis pakaĵojn kaj veturis post ŝin — mi havis monon sole por la kvara klaso; kaj ni interkonsentis.

Poste Charlie veturis Amerikon kaj mi revenis Wien'on. Mi komencis labori por mia habilitacia verko pri la sinmortigo. Subite mi ricevis telegramon de sinjoro Garrigue, ke Charlotte falis el veturilo kaj estas forte vundita, ke mi alveturu. Kiam mi faris preparojn por forvojaĝi, venis letero de ŝi, ke la afero ne estas tiom malbona kaj ke mi ne bezonas interrompi mian laboron. Sed mi estis maltrankvila kaj mi tamen veturis, en la jaro sepdekoka sur la ŝipo „Herder“ trans Hamburg kaj Havre en Amerikon. Tiame la veturo el Hamburg en Amerikon daŭris dekdu — dekkvar tagojn; sed nia marveturo estis speciale malbonvetera, tial ni bezonis deksep tagojn. „Herder“ kaj vico de aliaj ŝipoj de Hamburg-Amerika linio estis tre malbonaj; „Herder“ dronis dum la sekvanta veturo, egale malaperis tiam „Schiller“. Unufoje dum nokto, kiam mi jam kuŝis en kabino, oni aŭdas fortan baton kaj en kabinojn eniĝadis akvo; mi devis konjekti, ke ni dronas — sed tio estis stranga: la aliaj vojaĝantoj estis timplenaj, kriegis kaj preĝis, sed mi restis senmove kuŝi kaj trankvile atendis, kio okazos... Fakte sole krevis kaldrono kun trinkakvo. Charlotte'on mi trafis preskaŭ sanigitan.

Sed kion nun? Mi meditis, ĉu mi restu en Ameriko kaj trovu ian okupon, ĉar la vivorimedojn en Wien — lecionojn — mi perdis pro mia forveturo. Eble mi eĉ tie povus havigi al mi lokon en iu universitato aŭ ĉe iu ĵurnalo; sed tamen ni decidis, ke mi re-

venos kaj finos mian habilitacion. Do mi petis sinjoron Garrigue, ke li donu al ni monon por tri jaroj antaŭ ol mi povos vivoteni familion. Sinjoro Garrigue estis tia malnova Viking kaj Amerikano; en Ameriko estas memkompreneble, ke la homo, kiu edziĝas, scias li mem nutri sian edzinon. Tial li komence rifuzis la subtenon, kiun li rigardis kiel dotajon; sed poste li tamen donis al ni tri mil markojn kaj veturbiletojn. Iun tempon li sendadis al ni malgrandan subtenon. La dekkvinan de marto okazis la edziĝo, matene la civila en urbestrejo, vespere la religia en familia rondo. Post unu semajno ni veturis en Wien'on. Dum tiu vojaĝo mi duan fojon vizitis Praha'n.

*

Tiom mi jam diris al vi, ke la familio de Charlotte estis patre dana; la patrino estis Amerikanino kaj laŭ genealogoj la ambaŭ familioj estis neordinare malnovegaj; la familio Garrigue devenas el suda Francujo — ĝis nun estas tie montaro — La Garrigue — kaj laŭdire ĝi estis posteuloj de Kapetidoj, eĉ de Ludoviko IX Sankta; ankaŭ laŭ patrina deveno ĝi estas malnova, oni dirus aristokrata, familio. Ĝi estas el „patroj pilgrimantoj“, kiuj elmigris el Anglujo pro religia konvinko en XVII jarcento. Sekve laŭ tio en vejnoj de miaj infanoj cirkulas reĝa sango; se ili estis bonegaj viroj, estas bone; sed apenaŭ ĉiuj estis bonegaj homoj. Por ĉiu estas valora la fakto, ke liaj antaŭuloj havis ian signifon kaj ke ili estis honestaj homoj; ekzemple Tolstoj entuziasme klarigis al mi unufoje, ke kelkaj el liaj antaŭuloj estis eminentaj homoj; havi en sia familio kaj antaŭularo brilan modelon kaj tradicion estas feliĉa sorto. Laŭ patra deveno, de mi, havas miaj infanoj sangon slovanan, kampistan, kaj tiu estas pli multa; eble ĝi estas neniel malpli juna — honesta antaŭulo kampista aŭ laborista ne estas malpli bona. Nu — bele estis, kiel Charlie tradicie transprenis belajn ĉiutagajn kutimojn kaj bezonon de libereco kaj honesteco. Kaj mirinde: pentristo Schweiger, kiu multe rilatis kun aristokrataj familioj, ofte diris, ke per sia konduto kaj ĉiu movo mia edzino

estas la plej granda aristokratino, kiun li vidis. Kaj kiam en la jaro 1906 laboristaro faris demonstraciojn por libera, egala, sekreta balotrajto, mia edzino iris en ilia marŝantaro.

Charlie estis unu el dek unu infanoj; du estis knaboj, unu el ili komercisto, la alia studis, sed baldaŭ mortis; la knabinoj estis tre talentaj kaj sendependaj, du ĝis hodiaŭ estas bonegaj instruistinoj pri muziko. Ĉiu membro de la familio apartenis al alia religio, li estis edukita libere, por ke li mem maturiĝinte decidu pri sia religio. Mr. Garrigue estis agnostikulo — tiam agnostikulojn oni ofte nomis ateistoj — sed homo morale bonega, bona edzo kaj patro — vera Amerikano edukanta infanojn por laboro kaj vero. Charlotte estis unitarianino.

Per sia ekstero ŝi estis belega; ŝi havis eminentan kapon, pli bonan ol mi; estas karakterize, ke ŝi amis matematikon. La tutan vivon ŝi sopiris je ekzakta kono; sed per tio nenion perdis ŝia sento. Ŝi estis profunde pia; la morto estis por ŝi sole transiro el unu ĉambro en la alian, tiel firmege ŝi kredis nemortecon. Koncerne la moralon ŝi neniom havis el tiu morala anarkismo, kiu estas tiel disvastiĝinta en Eŭropo, nome sur ĉia kontinento; tial ŝi estis tiel preciza kaj firma en la politiko kaj sociaj problemoj. Ŝi estis absolute senkompromisa kaj neniam ŝi mensoĝis; ŝiaj veremo kaj nekompromisemo havis grandan edukan influon je mi. Kun ŝi mi ricevis el protestantismo en mian vivon tion plej bonan: tiun unuecon de la religio kaj vivo, religian praktikon, religion por labortagoj. En Leipzig, en tiuj interdiskutoj, mi konigis al mi ŝian profundecon: ŝiaj poetoj estis kiel la miaj, Shakespeare kaj Goethe, sed ŝi vidis pli profunden en ili ol mi, kaj ŝi sciis per Shakespeare korekti Goethe'on. Ĉion ni faris kune, eĉ Platon'on ni legis kune; nia tuta edzeco estis kunlaboro. Ŝi estis tre muzikema; ŝi amis Smetana'n kaj verkis por Naŝe Doba analizon de lia dua kvarteto; pri tiu oni nome asertis, ke en ĝi estas videbla la spirita malsaniĝo de Smetana. Pri Smetana ŝi skizis pli da studaĵoj; eble ili iam aperos.

Kion mi dirus al vi pri tio! Ĝi estis

tiom forta kuniĝo... Dum la milito ŝi malsaniĝis; mi tie eksterlande suspektis tion... Kiam mi estis tiel glorie revenanta en la jaro dekoka, mi sole atendis momenton, kiam mi estos kun la malsanulino.

Amerikanino fariĝis Ĉefino, morale kaj politike; ŝi kredis genion de nia nacio, ŝi helpis al mi en miaj politikaj bataloj kaj en mia tuta politika agado. Nur tiam dum la milito, eksterlande mi devis labori sen ŝi, sed mi sciis, ke mi agas en harmonio kun ŝi. Estis eĉ momentoj, kiam mi, malproksima de ŝi, el malproksimo senpere sentis paralelecon de niaj ideoj. Mi ne juĝas, ke tio estas telepatio, sed paralelaj pensado kaj sentado de homoj, kiuj en ĉio akordiĝas kaj egale rigardas la mondon. La virino, tio estis ŝia konvinko, ne vivas sole por la viro, kaj la viro ne vivas sole por la virino; ili ambaŭ devas serĉi leĝojn de Dio kaj efektiviĝadi ilin.

Nu, jes, mia edzeca stato kompletiĝis mian edukon, miajn Lehr- und Wanderjahre (jaroj de lernado kaj vagado), kiel mi dirus kun Goethe. Mi estis dudekokjara; ĝis la jaro 1882 mi docentis en Wien.

De tago al tago mi havis zorgojn pri la pano, kaj tamen venadis al mi bankistoj proponi al mi siajn servojn sole por miaj amerikaj milionoj gajnitaj per edziĝo. Dum la ferioj en Klobouky venis deputitaro de la tuta distrikto, ke mi konstruiĝu fervojon el Klobouky al Hustopeč. Ironio de la sorto — sed estis en tio eĉ sufiĉe da bonhumoro; unu burĝo de Klobouky venis viziti min kaj longe, kiel ni diris ĉirkaŭesploris, ĝis fine li malkaŝis, ke li venis por rigardi mian edzinon, ĉar li ankoraŭ neniam vidis — negron.

— — — — —

— — — Kiam mi jam estis prezidanto, venis al mi germana filozofo Fritz Mauthner, ke li volas nenion, kiel li diris, sole rigardi, kiel aspektas feliĉa homo. Feliĉa, kial ne? Sed, eĉ se mi estus restinta forĝisto en Ĉejĉ, mi kredeble estus egale feliĉa, kiel mi estas nun. Ĉefa afero estas, havi vivon riĉan de okazaĵoj kaj de interna evoluo — en tio mi povas esti feliĉa.

MASARYK — METIA LERNANTO.

En Ĉejĉ la patro min donis kiel lerno-knabon al la forĝisto de l'imperiestra bieno, nia najbaro. Koncerne la forĝistan metion, tiu plaĉis al mi; tio estas laboro, por kiu necesas forto kaj rapideco kaj dum kiu oni ne faras multajn parolojn; la majstro estis en ĉiu metiejo granda aŭtoritato, lin sekvis laboristoj laŭ la aĝo aŭ la tempo, dum kiu ĉiu laboris ĉe la majstro; la laboristo jam havis iom da rajtoj kaj se lernoknabo kuraĝus fari ion, kion li ankoraŭ ne rajtis, ekzemple fumis aŭ akompanis knabinojn, li ricevis kapofrapon, ho je! En la forĝejo oni somere laboris ofte de la tria matene ĝis la deka aŭ la dekunua nokte, kiam oni riparas plugilojn kaj veturilojn kaj hufumis ĉevalojn. Kaj laboro ĝi estas bela; forĝisto ĉe fajro kaj amboso estas mastro de la malmola materio. Ankoraŭ kiel gimnaziano mi foje, irante el Brno, surprizis vilaĝan forĝiston per tio, ke mi kapablis elforĝi najlon varmigante sole unufoje la feron. Nu, tion mi ne scias, ĉu la fingroj sur la dekstra mano mi tenas kurbe sekve de la laboro per marfelo. Ankoraŭ en la jaro okdekoka, kiam mi estis en Jasna Poljana, Tolstoj ekobservis miajn manojn kaj demandis min, ĉu mi estis laboristo. rh.

MASARYK PRI LA VIRINOJ.

Mi vidas la ĉefan kaj naturan diferencon inter la virino kaj la viro en tio, ke la virino, fariĝante la patrino, devas relative ne mallongan tempon sin dediĉi pli eksklude al la funkcioj kaj devoj patrinaj. De l'komenco mem de la kulturo la viroj okupis ĉiujn profesiojn pro tio, ĉar ili povis sin dediĉi al ili seninterrompe kaj enpremis per tio ĝis certa grado al la tuta kulturo la viran karakteron....

La virino ne estas ankaŭ fizike malpli forta ol la viro; mi petas, rigardu nur la profesiojn de la virinoj, ĉie al ili koncedatajn. Ĉu vi opinias, ke ekzemple instrui en lernejoj popolaj kaj etinfanaj estas malpli peniga ol portadi pezajn ŝarĝojn? Ĝis preskaŭ la tutan jaron en

lernejoj sen freŝa aero kaj suno kaj dediĉi la atenton al la infanoj, ĉu por tio necesas malpli da nerva forto ol por la viraj profesioj, eĉ se plej malfacilaj? Esti stenografistino, maŝinskribistino, telegrafistino, telefonistino, flegistino ktp, ĉu tio estas facila okupo? Kaj havi ĉiujare infanon, eduki aron da infanoj kaj zorgi pri ili tage kaj nokte, vivi duonon de la tago en la kuirejo kaj gvidi la ĉiutagan, regule modestan mastrumadon ktp, ĉu tio estas pli facila ol la okupo de la viro? Tiu forlaboras siajn ok horojn, kaj poste li estas libera kaj iras „riposi“ en gastejon al siaj kamaradoj, iras al kafejo, klubo, kunvenoj ktp — ĉu tio estas pli malfacila ol tiu ĉiutaga, konstanta unuforma laborego de lia edzino?

Al mi estas memkomprenebla, ke estas eraroj ĉe la virinoj, sed ili estas ĉe la viroj ankaŭ, eraroj estas en nia tuta kulturo; sed mi ne filozofos pri tio, kiu duono de la nia kaj de ĉiuj ceteraj popoloj estas pli kulpa; la klopodoj de la virinoj pri egalrajteco kun la viroj estas ĝustaj kaj mi deziras al ili pro tio plenan sukceson. rh

MASARYK PRI T. N. BONAJ HOMOJ.

La emfaza parolado pri agoj, komprenu agoj grandaj, restas ordinare senfrukta, restas babilado ne transiranta en la muskolojn; tiel Havlíček batalis kontraŭ tiu senaga patriotado kaj sammaniere decas kondamni la senpraktikan paroladon pri la amo al la proksimumo ĝenerale. La amo, la humaneco, la internacieco fariĝis multloke profesiulaj frazoj, pozo, praktika ja por frazistoj kaj pozistoj, sed ne por niaj pli kaj malpli proksimaj kunhomoj.

La amo, kiun Jesuo predikis, ne estas indiferenteco, nek pasiveco, sed aktiveco, agemeco, decidemo, kuraĝeco kaj laŭ bezono batalo. La batalo, ne la perforto. La batalo kontraŭ la filistreco, ne nur de viroj, sed ankaŭ de virinoj. Ankoraŭ ĉie kaj ĉiam la sanan progreson malhelpas maljunulinoj de virina kaj de vira sekso. Kontraŭ ŝtelistoj kaj murdistoj ni havas la policon, sed ni ofte estas senpovaj kontraŭ la neakti-

vemo kaj neenergieco de la t. n. bonaj homoj, la homoj nepraktikaj kaj indiferentaj.

—

Mi diras: Ami la malamikon estas eble. Mi ne volus paroli kontraŭ tio. Sed mi mem agas laŭ la regulo, ke ni devas esti al la malamiko justaj! Se ni ne kapablas ami la malamikon, ni ne mensogu al ni kaj al la aliaj, ke ni lin amas. Se ni ne amas lin, do ni estu almenaŭ justaj al li. Tiaj ni devas esti. Alian regulon prezenti, pli praktikan, estas neeble. rh

T. G. MASARYK EN ESPERANTO.

I.

(El liaj verkoj)

Evoluciismo. Trad. N. B. Bohema Esperantisto 1903 (jarkolekto I., paĝo 105).

Laboro kontraŭ revolucio. El la „Sociala problemo“. Trad. Th. Čejka. Bohema Esperantisto 1909 (III., 121).

Moderna amo. El la „Sociala problemo“ kaj el la enkonduko de studaĵo pri Kirějevski. Trad. Rud. Hromada. Bohema Esperantisto 1910 (IV., 86).

La esenco kaj evolucio de la humaneca ideo. I, ĉapitro de „Idealoj de la humaneco“. Trad. H. K. Bouška. Bohema Esperantisto 1910 (V., 38, 72).

Pri la socialismo. II, ĉapitro de „Idealoj de la humaneco“. Trad. H. K. Bouška. Bohema Esperantisto 1911 (V., 89, 143).

La unua komuniko al la nacio. Tr. ? La Progreso 1920 (III., 15).

Letero al G. V. Plechanov. El Ruskija Vědomosti 1917. Trad. ? La Progreso 1920 (III., 20).

Fragmentoj el paroloj kaj verkaro. Tr. M. Kubásková. La Progreso 1920 (III., 21).

Politika antropomorfismo. El „Prager Presse“. Tr. ? La Progreso 1921 (IV., 73).

Pri socialismo. Tr. F. Š. La Progreso 1922 (V., 1).

Parolado al la infanoj. Tr. S. Dlouhá. La Progreso 1928 (XI., 70).

II.

(Pri lia vivo kaj laboro.)

La unua prezidanto de la Ĉeĥoslovaka respubliko T. G. Masaryk. De J. Císař. Trad. Rud. Hromada. Broŝureto 16 p. Praha, 1920. Senpage dissendata en februaro 1920.

T. G. Masaryk. De ? La Progreso 1920 (III., 14).

„The Times“ pri Masaryk. Trad. ? La Progreso 1920 (III., 20).

T. G. Masaryk 71-jara. De ? La Progreso 1921 (IV., 22).

T. G. Masaryk 72-jara. De ? La Progreso 1922 (V., 22).

La fondintoj de ĉeĥoslovaka respubliko: Masaryk kaj Beneš. De H. B. Květoň. La Progreso 1925 (VIII., 34).

Nova prezidento de CSR. De bšk. La Progreso 1927 (X., 35).

Prezidento Masaryk kaj esperanto. De Root-Echtner. La Progreso 1928 (XI., 70).

Malriĉa knabo kiu gloriĝis. De Dr. Jan Herben. — Trad. T. Mrázková kaj B. Pittner. Moraviaj Esperanto-Pioniroj Olomouc. 136 p. 15×20 cm. — 16 Kč.

BIOGRAFIO DE MASARYK EN ESPERANTO.

Dr. Jan Herben: **Malriĉa knabo, kiu gloriĝis.** Tradukis T. Mrázková kaj B. Pittner. Eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj en Olomouc. Paĝoj 15×20 cm. Prezo 16 Kč aŭ 2,50 Frsv.

Dr. Jan Herben estas ĉeĥoslovaka ĵurnalisto kaj politikisto unuaranga, multjara poliĉika kaj ĵurnala kunlaborinto de Masaryk, lia persona amiko. Li verkis en j. 1929 bonan, koncizan kaj tre fidindan biografion de Masaryk, kaj Moraviaj Esperanto-Pioniroj eldonis al la okdeka naskiĝtago de Masaryk tradukon de tiu verko en libro bele presita kaj plaĉe aranĝita. Oni devas antaŭ ĉio laŭdi la elekton mem de la verko, ĉar la biografio de Herben estas

verko populara en la plej bona senco de la vorto; ĉar ĝi povas diri ion sciindan kaj pripensindan al ĉia leganto. La verkinto ne skizas sole la eksteran flankon de la Masaryka vivo, li ankaŭ pentras per nemultaj, sed neordnare trafaj vortoj la situaciojn, el kiuj la Masaryka konduto eliradis kaj kiujn ĝi transformadis. Tial la verketo de Herben estas skizo de la evoluo de la ĉeĥoslovaka publika vivo dum la lastaj 60 jaroj kaj ĝi povas esti laŭ mia opinio tre instrua legaĵo por fremdlandaj legantoj. Ankaŭ la ideoj de Masaryk, ilia evoluo, kaj klopodado por efektiviĝo de liaj idealoj estas de Herben priskribitaj laŭvere kaj klare.

La tradukan lingvaĵon oni povas sincere laŭdi. Oni povas legi ĝin tre flue, la parolturnoj estas simplaj respondante al la stilo de la originalo. Mi riproĉus sole meti adjektivon rilatantan kun „oni“ en pluralon; certe estas logike diri oni estas laŭdataj, sed ĝi estas kontraŭ uzo de la lingvoj, el kiuj tiu pronomo estas prenita. Laŭ mia sperto oni ĉiam parolas pri la 14 punktoj de Wilson, ne pri artikoloj. Neagrabla estas preseraro sur paĝo 106 „aliaj“ anstataŭ „iliaj“ (reprezentantoj). En 3-a rimarko mi preferus diri, ke la nuna literatura slovaka lingvo devenas de Štúr, ne de Bernolák. En rimarko 37. mi volus legi, ke Štefánik estis Slovako. Sed tio estas bagatelaj riproĉoj rilate la laŭdon, kiun ĉiu leganto devas doni al la traduko kiel tuto. Ankaŭ la 10 paĝoj da rimarkoj destinitaj por la fremdlanda leganto estas tre laŭdindaj, ĉar ili informas koncize kaj fidinde. La prezo de la libro ne estas alta. Tial oni povas sincere rekomendi ne sole la legadon de la verketo, sed ankaŭ ĝian akiron. La eldonintoj meritas dankon de la tuta esperantista legantaro pro livero de verko tiom valora.

St. n. K a m a r y t.

Kliŝaĵoj por niaj bildoj estis pruntedonitaj de ČTK. (Ĉeskoslovanská tisková kancelář.)



LA XI. ĜENERALA KUNVENO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPE- RANTISTA

okazas dimanĉe la 13. Aprilo 1930 en
Praha:

9—12 en kafejo „Urban“, Václavské
nám. 33. I. et.
14—18 en Odborový dům, Perštýn, 11.



Včasné vycházení zajišťují ti, kteří včas platí předplatné.

Děkujeme Vám srdečně, máte-li též zapláceno.